

# ELNA NEWSLETTER

## NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Bimonthly organ of the Esperanto League for North America, Inc., Box 1129, El Cerrito, CA 94530 USA.  
Telephone (415) 653-0998. Editor: Catherine L. Schulze. Graphics: Wm. R. Harmon. Includes promotional  
section in English and informational section in Esperanto for ELNA members. ISSN 0030-5065. Vol. 15, No. 3  
May-June 1979




Mr. & Mrs. Krstic, Esperantists  
(Moma Krstic, Jugoslavia; Tomoko Kato, Japan)

I LOVE YOU  
JE T'AIME  
ICH LIEBE DICH  
TE QUIERO  
TE IUBESC  
IO TI AMO  
ICH LIEB DICH  
AH-HI-BICK  
JEG ELSKER DIG  
SENI SEVIYORUM  
WATAKUSHI WA ANATA GA  
SUKI DESU  
MI AMAS VIN

english  
french  
german  
spanish  
roumanian  
italian  
yiddish  
arabic  
danish/norwegian  
turkish

japanese  
esperanto



**INSIDE:**

**JUNE, the month**

**ESPERANTO, the language  
of ROMANCE**



L to R: Father of groom; Best Man, Ian Carter; Mr. & Mrs. Marshall (Andrew D. Marshall, England, and Klara Masumi Ogawa, Kyushu, Japan, both Esperantists); Father of bride.

### INTERNATIONAL ROMANCE NEEDS AN INTERNATIONAL LANGUAGE

"The civil wedding ceremony immediately after leaving the ship in Vera Cruz was conducted in Spanish which I did not understand. It was as though it had nothing to do with me", confided an Esperantist friend. A Belgian nurse, she married a Mexican General after a romantic courtship conducted in Esperanto. Being very correct, he would not travel with her to Mexico City unless they were properly married. A religious ceremony in Esperanto could be performed later.

Esperanto has been promoted as a communication tool for every kind of human activity. Not the least of these is its role in furthering international romances.

Wally du Temple of British Columbia assures us that misunderstandings can be more easily resolved when there is direct communication. He tells how, at the Ball during the 1969 Esperanto Convention in Helsinki, an attractive young Bulgarian flirtily announced she would like to dance with him. Munching on a sandwich he nodded assent and was bewildered when she walked off in a huff. He quickly learned that an affirmative nod means "no" to a Bulgarian and was forgiven for his gaffe. Eventually, Mr. du Temple married a Czechoslovakian and their children are growing up speaking English and Esperanto as naturally as you please.

Frequently in international marriages among Esperantists, until the bride learns the language of her husband, Esperanto is the first language in the home and is what the children hear first. The baby is lulled to sleep with Brahms's, an Israeli's, or some other lullaby sung in Esperanto. Children grow up accustomed to hearing Esperanto spoken at the dinner table when foreign Esperantists visit.

At the home of Jacobus Hammer of Zaandam, Netherlands, a high school teacher and head of the Esperanto Boy Scout Association, foreign guests are invited to autograph the white table cloth. Later Mrs. Hammer embroiders this so that one dines there amid the names of Esperantists who came before. Without ever leaving home, the Hammer children learn about other peoples, their customs, money, language and much more.

Young Japanese women seem the most enterprising in using Esperanto as an EDZ-peranto (a play on words in Esperanto meaning "an instrument for getting a husband").

At age sixteen, my interest in Esperanto began when our English teacher described Esperanto as a language for international communication. Almost as an afterthought she mentioned it was responsible for many international romances. From the beginning, Esperanto has been for me the language of Romance.

...Cathy Schulze

## NEWS OF ELNA'S SISTER ASSOCIATIONS

### Mexico:

In December, ELNA was represented at the Esperanto Leadership Seminar in Oaxtepec, Mor., Mexico by Walter Gnagy of Alaska, Robert D'Francesco and Grant Goodall of California. The Mexican Esperanto Youth Association is cooperating with **Friendship Force** which has begun an exchange of Ambassadors of Friendship under the sponsorship of Mrs. Carmen Romano de Lopez Portillo and Mrs. Rosalynn Carter. MEYA received letters of thanks from the U.S. Ambassador.

### ORGANIZATION OF AMERICAN STATES and UNIVERSAL ESPERANTO ASSOCIATION COOPERATING

Dr. Humphrey Tonkin, President of the Universal Esperanto Association, announced acceptance of an agreement for cooperation with the OAS in cultural, intellectual and educational matters. Conforming to its constitution as a neutral international organization, UEA offers its resources to ease the language problem. OAS, in turn, will inform UEA members about its work and programs. Alejandro Orfila, General Secretary of OAS, suggested that a beginning be made with an exchange of documents and publications and sending observers to public meetings where views can be exchanged on matters of mutual interest.

Dr. Karl Augustus Menninger was quoted by Pulitzer prize winning science writer Gobind Behari Lal in an article, "The Disease of Society — Revenge" (*San Francisco Examiner*, May 6th): "Out of Spanish America came a very great leader, Simon Bolivar, the liberator of Hispano-America..."

Menninger counts Bolivar among the great changers of history who fought without the spirit of vengeance, a most difficult thing to do.

This timely agreement between UEA and OAS gives promise that Esperantists on other continents will become more knowledgeable about the history and cultures of Latin America. The growing interest in Esperanto in Latin America and the World Esperanto Convention scheduled for Brasilia in 1981 make this new collaboration potentially useful in furthering interpersonal relations.

### ESPERANTO OVERSEAS

**Education-Esperanto-Europe** — The three E's attracted visitors to the Esperanto booth at the Industrial Fair during April in Neustadt/Weinstrasse, West Germany. Dr. W. Brix, Mayor, was among the prominent officials who stopped for information. Serious discussion led to the conclusion that Esperanto should be taught in all European schools.

"**Promotion of European Citizenship**" was the theme of a joint convention of the Netherlands and German Esperanto Associations held in April. Representing 13 native languages, the 280 participants developed a paper setting forth the worsening language problem in the European Community with all the attendant costs. The anticipated joining of Greece, Portugal, and Spain to the EC will further complicate the communication problem, causing a shortage of competent translators and interpreters.

The paper, directed to European Community citizens and authorities, recommends that the neutral international language Esperanto be selected to solve the problem. Once the decision is made to teach the language in all EC schools, full implementation of Esperanto can come within a generation.

**The European Federalist Party** at its Spring conclave adopted Esperanto as its working language, first in its Executive Committee and General Council. Beginning in October, minutes will appear in Esperanto and all letters to the Secretariat must be in Esperanto. The Party will be officially represented at the World Esperanto Convention in Lucerne, where it will staff an information booth.

## RAPORTO AL LA MEMBRARO

Laŭ Sekcio 607 de la Statuto de ELNA, sekvas raporto pri decidoj de la Estraro kaj la Prezidanto ekde la lasta Kongreso en 1978:

1/79: Dungis S-ron Jack Lesh kiel Direktoron de la Centra Oficejo inter oktobro 1978 kaj aprilo 1979, kaj dungis Grant Goodall kiel Direktoron dumtempa, dum la periodo 15a aŭgusto-15a septembro. Aprobata unuanime.

2/79: Ratifis interkonsenton de Prezidanto Harmon kun la Kanada Esperanto-Asocio diskutita dum la 1978a Kongreso. Aprobata unuanime.

**NOTO:** La principoj aprobitaj estis jenaj:

(a) Ke la prezidanto de unu organizo estu nomita "honorofica membro" de la alia.

(b) Komunaj kongresoj de la du organizoj okazu laŭeble.

(c) La organoj estu senditaj al la Estraro de ambaŭ organizoj senkoste.

(d) Dum jaroj kiam komuna kongreso ne okazas, la Prezidantoj de la du organizoj sendu "kongresan mesaĝon" al la alia.

(e) Ĉiuj informiloj kaj broŝuroj eldonitaj de ambaŭ organizoj portu la nomojn kaj adresojn de ambaŭ organizoj.

(f) La du organizoj komune starigu provizon de aŭdvidaj materialoj pri Esperanto, kaj la komuna provizo estu havebla al ambaŭ. Estis sugestite, ke S-ro Ken ver Ploeg, la Komisiito de ELNA por Aŭdvidaj Aferoj, estu tiu konservanto.

(g) La prezidantoj de ambaŭ organizoj daŭre interŝanĝu komunikojn pri novaj projektoj pri lernolibroj, kaj kiel eble kunfandu la laboron por helpi al ambaŭ.

3/79: Rajtigis la elspezon de ĝis \$250 por ebligi uzadon de komputila servo por ELNA/UEA informo. Aprobata unuanime. **NOTO:** La sumo estis kalkulita por antaŭviditaj komencaj elspezoj por enigi la informaron en la komputilon, kaj pagi por la presitaj adresoslipoj kaj raportoj por la resto de 1978. Fakte, malpli ol tiom estis elspezita. La kosto de preparo de adresoslipoj por *Newsletter*, informiloj, *Adresaro*, *Libroserva* informo, ktp ankoraŭ estas tre malalta per la komputila sistemo, kaj ŝparas multe da tempo por la CO. D-ro Jonathan Pool multe helpis ebligi la komputilan aranĝon, kaj la Ligo dankas al li.

4/79: Aprobis sidejon kaj tempon por la ELNA Kongreso en 1979: ĉe San Francisco State University, San Francisco CA, je 13-17a julio 1979. Unuanime aprobita.

5/79: Rajtigis la Prezidanton trovi kaj dungi taŭgan Direktoron por la CO post la foriro de Jack Lesh en aprilo 1979. Unuanime aprobita. **NOTO:** ELNA estis bonŝanca, havi sinsekvon de taŭgaj kaj kapablaj (kaj laboremaj!) Direktoroj por la CO: Charles R.L. Power (nun la KKS de UEA), Hal Dreyer, Jonathan Cole, Jack Lesh, Grant Goodall. Post la aprobo de ĉi tiu propono, la prezidanto aranĝis serion da dungoperiodoj; post la foriro de Jack Lesh en aprilo 1979, estis dungita Donald Harlow, kiu, se Jack Lesh ne revenos al la posteno en la vintro de 1979, restos la ĉefa Direktoro. Por ebligi al Jonathan Cole veni al Kalifornio por instrui ĉe la someraj kursoj ĉe San Francisco State University, li estis dungita por tiu parto de la somero kiam li ne instruas, kun Don Harlow laborante intertempe. Ankoraŭ la prezidanto persone reĝisoras kaj gvidas la laboron de la CO, por ke estu facila transiro inter la direktoroj. La laboro ĉe la CO estas ja pli ol la ordinara ŝarĝo por unu homo; sed kun la helpo de volontuloj kaj de la prezidanto, la CO povas plenumi siajn taskojn sen pli ol unu salajrita persono.

Nun konsiderataj de la Estraro estas la jenaj projektoj:

(1) Kotiza strukturo de ELNA.

(2) Ĝisdatigo de la Statuto de ELNA, por rekoni la rolon de la CO kaj modernigi la labormetodojn. [*Noto: Ĉi tion la Kongreso en SF debatos ankaŭ.*]

(3) Korporacia stato de ELNA.


(4) Eldonaj planoj de ELNA.

**Baldaŭ konsiderotaj:** Rilato al la nova UEA-projekto en Novjorko kun UN kaj OAS; Plua uzo de komputilo; Publikigo de fideaj aranĝo kun Bank of America por ebligi heredaĵojn al ELNA.


Wm. R. Harmon, Prez-0

Donald Harlow will be one of the guest lecturers, on Astronomy, among the many features this year in **ESPERANTO FOR EVERYDAY**, one of the courses directed by Dr. David Jordan at San Francisco State University, June 25 - July 13. The ELNA Convention follows immediately, permitting implementation of the language in a cultural setting.

-----  
 Send in your registration  
 for the Convention today!!  
 Extra forms available from  
 the ELNA Central Office.  
 -----



*Ni konsilas rapidon!*



**ELNA BOOKSERVICE - NEW OFFERINGS - CHECK THESE!**  
Holzhaus: *Elekto de Internacia Lingvo*. Broŝurita. \$8.50. 152 p. Kopioj de pamfleto elsendita de Zamenhof en 1897 sub la nomo "Elekto de Internacia Lingvo" en lingvoj rusa, franca, germana, angla. Kun tradukoj de Holzhaus kaj diversaj aliaj.

Bernasconi: *Esperanto aŭ Interlingua?*. Brosurita. \$13.95. 163p. Bonega skizo pri la strukturoj de Esperanto kaj Interlingua kaj relativaj meritoj, kaj ankaŭ bona, science verkita, defendo de la tuta planlingva ideo. Enhavas elstaran klarigon pri la sintenoj de la esperantistoj kaj de la "naturalisma" skolo, kaj kontrastas tiujn.

Piron: *Esperanto: Ĉu Europa aŭ azia lingvo?*. Brosurita. \$1.75. 32p. CED ESPDOCS #10. Piron prezentas kaj provas pruvi la tezon, ke Esperanto estas fundamente izola lingvo, kiel la ĉina. Bona ekspliko de la strukturo de nia lingvo.

Gilbert: *Planlingvaj Problemoj*. Brosurita. \$7.50. 99p. TK/Stafeto Beletraj Kajeroj #12. Reeldono de klasika planlingva libro, kiu kontrastas Esperanton kontraŭ la naturalismaj projektoj Occidentala kaj Interlingua. Multe subtenas sin de la nun nehavebla *Lingvo kaj Vivo* de Waringhien.

Bernard: *Raymond Schwartz: Lia Vivo kaj Verkaro*. Brosurita. \$2.50. 22p. Biografia kaj literatura skizo pri la konata esperantista/alzaca humoristo, kun pluraj ekzempleroj el lia verkaro.

Jokai: *Filoj de l'Ŝtonkora Homo*. Brosurita. \$3.50. 60p. Bildstrie adaptita romano de la konata hungara verkisto de antaŭa jarcento. Temas pri tri fratoj en Hungarujo dum la revolucio de 1848 kontraŭ la monarĥio.

Dresen: *Estonia Soveta Poezio*. Brosurita. \$3.95. 203p. Poeziaĵoj de diversaj poetoj en la nuntempa, soveta Estonio. Tradukitaj de konata esperantista poetino.

---: *Kial Ne?*. Festa Numero. Brosurita. \$2.50. 99p. Diversaĵoj el la organo de la Junularo Esperantista Brita. Havinda pro tio, ke ĝi enhavas esperantlingvan adaptan de la "Ballad of Eskimo Nell", kiun verkis A. N. Nimulo. (vidu recenzon aliloke)

---: *Esperanta Meslibreto*. Brosurita. \$1.00. 16p. La katolika meso en Esperanto.

Krisnamurti: *Fronte al la Vivo*. Brosurita. \$1.25. 39p. Enkonduko kaj eltiraĵoj el la libro *Life Ahead* de Krisnamurti.

Veselin Damjanov *Kantas en Esperanto*. Granda disko 33-1/3. \$11.00. La bulgara baritono kantas en Esperanto diversajn kantojn; esperantaĵojn, opera-ĉerpaĵojn, popolkantojn.

---: *Praktika Bildvortaro de Esperanto*. Brosurita. \$6.75. 96p. Lautema, kolorplena bildvortaro eldonita nur lastatempe de Oxford University Press. Bonega por ĉiuj, aparte bona por infanoj.

Sire: *Noktoj*. Brosurita. \$2.50. 40p. Bildstria rakonto de la "subtera" speco.

Anon.: *Libro de Amo*. Brosurita. \$13.00. Enhavas, krom la "Sekretajn Sonetojn" de la mistera "P. Peneter", ankaŭ aliajn utile maldecajn poemojn kaj difinojn. Eleganta Rubenseska kovrilbildo. (Noto: Ankoraŭ haveblaj 2 ekz. de la 1969a eldono, binditaj, po \$20.50.)

---: *Esperantologiaj Kajeroj 3*. Tria en la serio de dikaj (ĉifoje 375-paga) volumoj pri Esperantologio eldonataj ĉiujare de la Universitato Eotvös Lorand en Hungarujo, sub la gvidado de D-ro Szerdahelyi. Ĉi tiu numero plene dediĉiĝis al la forpasinta lingvisto kaj beletristo Barczy Geza, kaj estas kvazaŭa frandputo por liaj verkaĵoj. \$13.50.

---: *Paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof*. Brosurita. 79 p. \$1.80. Eld. Japana Esperanto-Librokooperativo. Enhavas la paroladojn de Zamenhof ĉe la Universalaj Kongresoj I (Boulogne) ĝis VIII (Krakow) plus "Deklaracio pri Esperantismo" kaj "Homaranismo" kaj "Letero al Borovko".

Kidosaki: *Zamenhofs Legolibro*. Eld. Japana Esperanto-Instituto. 106p. Brosurita. \$2.50. Enhavas diversajn ĉerpajojn el la verkaro de LLZ. Notoj kaj kronologio estas en la japana lingvo, sed la artikoloj kaj rakontoj kaj leteroj kaj tiel plu mem restas en Esperanto.

---: *Antaŭen al la Laboro!*. \$16.50. 350 p. Bele bindita. Tria kajero en la serio "iam kompletigota plena verkaro de LLZ". Notoj kaj klarigoj. Eldonis "Eldonejo Ludovikito" en Japanujo. Zamenhofaĵoj de la jaroj 1892-1895. Ankaŭ enhavas ampleksan alfabetan indekson kaj kronologian indekson. (Noto: La kvar aliaj verkoj en ĉi tiu serio ankaŭ haveblas ĉe ELNA Libroservo.)

## RECENZO

### Tiu ĉi poezilibro tute ne estas troa!

Tro multaj libroj kun poezio aperas. Tio estas mia opinio, ĉar mi kiel teknikisto vere sentas mankon de fakaj libroj.

Nun fakte okazis, ke mi legis poemojn. La aktuala libro en tiu ĉi recenzo vekis mian unuan atenton, kiam mi ekvidis la ĉarman desegnaĵon sur la frontpaĝo. Mi trafolumis la libron kaj trovis plurajn vere belajn ilustraĵojn.

Ne estis mia intenco legi ĝin, sed mi provis legi almenaŭ unu verson. Mi komprenis, ke ia surprizo sin kaŝis ie en la lasta strofo de tiu poemo. Do—mi legis la versojn de la poemo ĝis la sprita fino.

Sekve mi demandis, ĉu mi rajtas prunti la libron. Mi kunportis ĝin hejmen kaj post enlitiĝo mi legis 25 el la 49 poemojn.

Kia libro! Imagu al vi libron kompilita el la plej bonaj poemoj el la sveda *Barndomslandet* (Lando de l'infanaĝo). Mi fariĝis vere surprizita pro la rekta facile komprenebla lingva stilo. Perfekta ritmo, kun tre variaj, spritaj, dolĉaj kaj humuraj poemoj. Laŭ la frontpaĝo la verkisto verkis por la geknaboj de la mondo. Feliĉe por ni, kiuj postlasis la junaĝon, tiu ĉi libro, laŭ mia koncepto, ne havas supran aĝlimon. Hodiaŭ mi devas redoni la libron al la posedanto. Kvankam mi tra legis la libron trifoje, mi devas aĉeti propran ekzempleron.

Roland Lindblom  
(el sveda revuo *LA ESPERO*  
februaro, 1979)

*POEZIA BUKEDO* Bertram Potts - \$6.00 - aĉetebla de la ELNA Libroservo.

"Kial Ne?" - Festa Numero, eldonita de Junularo Esperantista Brita; 1978. 100 p. \$2.50. 21cm. Havebla de ELNA Libroservo.

Jen veria malseriozaĵo por malseriozemuloj. Ĉi tiu verko estas kompendio de pluraj spritaĵoj el la paĝoj de la gazeto "Kial Ne?" de la Junularo Esperantista Brita dum du jardekoj. Ĉi enhavas ĉion — novelojn, artikolojn, krucvortenigmojn, instruon pri gitarado, karikaturaĵojn, enigmojn, ŝercojn...

Plej interesaj, tamen, estas du eroj en la libro. Unu estas la okparta, karikaturo, felietona romano pri la aventuroj de la Ŝtala Vireto, Superzam, alinome timema Doktoro Laplumo, mildmaniera profesoro ĉe granda metropola universitato, kiu, kun siaj du amikoj Reto kaj Riko, daŭre bataladas por vero, justeco, kaj la Esperanto-vivmaniero.

Eble pli grava, laŭ literatura vidpunkto, estas la esperantlingva adaptado (ne nura traduko) de la konata anglalingva balado "The Ballad of Eskimo Nell", kun titolo "La Eskimino". La verkinto, verŝajne nevo de Peter Peneter, kaŝas sian identon malantaŭ nomo "A. N. Nimulo"; kaj bonŝance li faris tion, ĉar ne farinte li nepre estus linĉita de furioza prudularo. La enhavo sufiĉe bone fidelas al la originalo, sed oni devas plendi, ke la adaptinto ŝanĝis la metron al trolonga heptametro.

Kajero entute havinda.

...Don Harlow

“TRADUKU EN NACIAJN LINGVOJN. La Nobel-premion por literaturo ricevis ĉijare Izaak Basevis Singer, kiu verkas en la jida lingvo. Pensigu nin ke la popularecon li atingis nur dank’ al certaj tradukoj de siaj libroj en naciajn lingvojn. Ĉu Esperanto-literaturo ne devus sekvi tiun ekzemplon? Eĉ se ‘minacos’ ĝin Nobel-premio, tia paŝo estas la nura solvo por diskonigi la internacian kulturon.” — J. Sulzyci [Pollando] en *Heroldo*, 20a feb. 1979.

D-ro E. J. Lieberman, eksprezidanto de ELNA, sekvante ĝuste tiun vojon, iniciatis korespondon kun Baldur Ragnarsson kaj komencis traduki lian poezion. Jen ekzemplero de nova traduk-talento:

#### NERIMARKITAJ HERBOJ

Donu la manon kaj mi gvidu vin  
inter la nerimarkitajn herbojn  
(certe ne tiujn de blu’ aŭ karmezin’  
kiuj tiklas ordinarajn cerbojn)

al lokoj kie pasas neniam firma plando  
ĉar flankas ilin konvencian rekton  
de tiuj inklinantaj preteri laŭ la rando  
kaj ne sentas eĉ suspekton

ĉe-baze apud stratolampaj fostoj  
troviĝas ĝuste tia izolo  
kiun vaghundoj tuŝas per la vostoj  
je radio de unu colo

kaj poste ekleviĝas singarda herber’  
kun tiu konvinkiĝo  
ke risko malplej granda sur misodora ter’  
estas malprestiĝo

kaj niaj alstaturetoj do ne hontigas tre  
la sparokreskan foljon  
ĉar gravas pli por ĝi la sava fakto ke  
ĝi mokas ambicion

--Baldur Ragnarsson [*Esploroj*, 1959]

#### UNSUNG LEAVES OF GRASS

Give me your hand and let me guide you  
among the leaves of grass unsung--  
oh, not blossoms lavender or blue  
that loose the ordinary tongue

to places firm sole never tread  
because they flank the beaten track  
of those inclined to move ahead--  
no wonderings to hold them back

beside a certain streetlamp post  
one lonely upstart can be found  
an inch or two of green at most  
where mongrels irrigate the ground

there a careful blade accepts its birth  
with this conviction growing slowly;  
a risk worth taking on this fouled earth  
is to be lowly

and so our big shots don’t much faze  
the frugal little shoot  
what matters is its power to amaze:  
it mocks ambition, making status moot

translated from the Esperanto original,  
*Nerimarkitaj Herboj*, by E. J. Lieberman

#### RECENZO

LINGVISTIKAJ ASPEKTOJ DE ESPERANTO - John Wells.  
Rotterdam: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda  
Lingvo-Problemo (UEA). 76 p. 23x17 cm. \$7.25. Havebla de  
ELNA Libroservo.

Ĉe la nomo de John Wells oni atendas bonan Esperantologion.  
La jena libro plenumas tiun atendon. La aŭtoro starigas sian celon  
en la unua alineo: “Kia lingvo estas Esperanto? Kie ĝi staras  
inter la lingvoj de la mondo?” Wells ekzamenas Esperanton  
tamen kiel nek sociologo nek interlingvisto studanta mondan  
interlingvon, sed kiel lingvisto, por “priskribi ĝin kiel lingvon laŭ  
la kriterioj kaj metodoj de la moderna lingvistiko” kaj rilatigi ĝin  
al konataj universalaj trajtoj de homaj lingvoj.

Li esploras sur kvar kampoj: lingvosonoj (*fonetiko*),  
vortofarado (*morfologio*), frazofarado (*sintakso*), kaj la vortoj  
mem kaj ilia signifo (*leksiko* kaj *semantiko*). Neeviteble, la  
fonetika ĉapitro uzas multajn simbolojn, kio postulas iom da  
studo de la eksplikoj en la teksto kaj la resuma tabelo; sed la  
argumentoj kaj konkludoj oni povas kompreni eĉ sen plena  
fonetika apreco. Ankaŭ la ĉapitro pri sintakso uzas iom (relative  
malmulte) da simboloj. Tiuj fortimigu neniun. Mi konas unu  
leganton tre inteligentan kiu, ne povante trabarakti la simbolojn  
kaj detalajn priskribojn de la fonetika ĉapitro (memoru ja, ke  
Wells estas fonetikisto), frustriĝis pri la tuta libro kaj komplete  
formetis ĝin. Sed la ĉapitroj estas sendependaj ĉiu de la aliaj, do  
oni povas legi ilin (post la Enkonduko) laŭ libera ordo kaj elekto.

En ĉiu ĉapitro Wells uzas ekzemplojn en lingvoj el ĉiuj  
mondpartoj kaj multaj lingvo-familioj — la zuluja, angla, keĉua,  
vjetnama, araba, kaj multaj aliaj — por elmontri la fonetikan  
(resp. morfologian) diversecon de lingvoj kaj la ordon kiun  
tipologia klasifiko faras el tiu diverseco. En tiun kadron li  
lokigas Esperanton, unu lingvon inter miloj; en ĉiu areo li  
dividas la trajtojn de unu aŭ pluraj grandaj tipoklasoj de la  
homlingvaro, kaj ofte ĝi montras la profundan lingvosenton kaj  
genion de sia kreinto.

La verko baziĝas sur prelegaro farita en la Internacia Somera  
Universitato de la Atena Universala Kongreso de Esperanto en  
1976 (Supozeble parte pro tio, la aŭtoro ne mencias inter la ĉ. 90  
referencitaj verkoj la 32-pagan libreton *Esperanto: Ĉu Europa aŭ  
Azia Lingvo?* [Claude Piron, 1977, N-ro 10 en la nova serio de  
Esperanto-Dokumentoj de UEA] kiu frontas similajn demandojn.)  
Ĝi estas senmakule presita, kiel oni atendus de UEA, kvankam eĉ  
nacilingvaj faklibroj en lingvistiko ofte plenas je preseraroj.

...Mark Mandel

#### DON QUIXOTE IN ESPERANTO IN SPAIN

The Esperanto translation of *Don Quixote*, *Inĝenia hidalgo Don  
Quijote de la Mancha*, Cervantes (Zaragoza, 1977) is receiving  
considerable attention in Spanish newspapers including *El  
Universal* in Mexico, and in Brazil as a result of an article on the  
subject written in Spanish by Prof. Pierre Ullman, Dept. of  
Spanish and Portuguese, University of Wisconsin-Milwaukee.  
Prof. Ullman’s scholarly review of the Esperanto translation in  
UEA’s review *Esperanto*, January, 1978, contributed much to a  
better understanding of this famous work.



## JARO DE LA INFANO!

**Internacia Jaro de la Infano** prezentos bonan okazon profunde mediti pri la cirkonstancoj, la privilegioj, la bezonoj kaj problemoj de infanoj; de ĉiuj morgaŭaj plenkreskuloj, tiel en materie bonfartaj kiel en ekonomie malriĉaj landoj. La Deklaracio difinas, ke infanoj havas rajton je amo kaj kompreno; je nutraro kaj medicina helpo; je senpaga instruado; je nomo kaj nacieco; je speciala zorgo, se ili estas invalidaj aŭ grave malsanaj; je tuja helpo ĉe katastrofoj; je eduko en paco, internacia frateco kaj mondĉivitaneco. Infanoj havas la rajton kreski kaj disvolviĝi kiel plenkreskuloj, kaj kiel tiaj ĉiuj havas la samajn rajtojn, nedependajn de raso, haŭtkoloro, religio, nacieco aŭ deveno. Infanoj havas la rajton vivi tiel, ke ilin ne malliberige manipulas la inklinoj kaj emoj, bezonoj kaj deziroj de gepatroj kaj aliaj edukantoj. Tro ofte plenkreskuloj devige preskribas jungilaron, en kiu infanoj devas vole-nevole kungalopi. Ni ne puŝu ilin en la kaĝojn, kiujn ni mem konstruis!

## EDUCATION NOTES

During the N.E. Conference on Foreign Language Teaching, April 19-22, Washington DC, Thomas Goodman, member of ELNA's Executive Board, conducted a workshop on Esperanto. He gave a brief overview of the Esperanto language and literature, the current uses of Esperanto in Maryland public schools and elsewhere; future projects and federal support; relation to other languages and motivating students.

Information prepared by the Maryland Department of Foreign Languages announcing the Esperanto courses, which Mr. Goodman will teach again this summer was distributed. This year the courses will be offered to the general public as well as to foreign language teachers.

Mr. Goodman has arranged for participation of the American Association of Teachers of Esperanto at the annual meeting of the American Council on Teaching Foreign Languages at Atlanta in October.

**President's Commission on Foreign Languages and International Studies.** Tufts College was the scene of a regional meeting of PCFL during May. Esperanto was ably represented at various sessions by Dr. John Lewine and Gerald Cirrincione.

Framingham (MA) South High School invited Gerald Cirrincione, member of the ELNA Executive Board, to speak about Esperanto at its International Festival April 25. Students asked lively questions, according to Florence Mack who teaches at the school.

Leston Buell of Milwaukie, OR, taught his first Esperanto class this Spring. Leston won one of the Portland Club's scholarships to the Esperanto courses at San Francisco State University last summer.

## PERIODAĴOJ – PERIODICALS

*INTERNATIONAL LAW REVIEW* (*Internacia Jura Revuo*) published in Oslo, Norway, appears semiannually and generally handles a variety of themes. No. 1/78 contained an article by J. S. Belov, "A Further Case of Illegal Psychiatric Abuse" which has appeared in translation in the German periodical *Das Menschenrecht* 3/1978. IJR 2/78 deals with such articles as "Religion and Society in the Old Testament" - Kapelrud, A.S.; "The English Judicial System" - Goulding, I.; and "A Legal Crisis Shocks Public Opinion in France" - Thierry, J.

*MEDICINA INTERNACIA REVUO* (Dec-78) komencas felietone la 70-jaran historion de la Universala Medicina Esperanto-Asocio. La aŭtoro, D-ro H. Shinoda, skizas la kontribuon de pioniroj fame konataj en la movado: D-roj Ludoviko L., Leono, Zofia, kaj Lidja Zamenhof (Polujo); G. Canuto (Italujo); K. Kalocsay (Hungarujo) kaj Hideo Yagi (Japanujo).

*INFORMILO*, la organo de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, aperas 4-foje jare - \$1.75 US. Usona Peranto: Julie Regal, 310 Fourth St., Downers Grove IL 60515.

*UNIVERSALA LIGO*, Bulteno de, (marto-aprilo 1979) anoncis la morton de Pastro D-ro Andreo Cseh. UL skizis la unikan karieron de Cseh de la starigo de lia fama instru-metodo en 1919 en Transilvanio, Romanujo, kiam li devis instrui al diverslingvaj laboristoj Esperanton. Tiu metodo estas ankoraŭ uzata, lastatempe de S-ino Vilma Eichholz en Srilanko, kie ŝi demonstris ĝin al pluraj eminentuloj.

Universala Ligo sin dediĉas al mondpaco. Por aliĝi, sendu postĉekon en sumo \$5.50 al Universala Ligo, PO Kesto 334, 1400 AH, Bussum, Netherlands.

*ORNITOLOGIA RONDO ESPERANTLINGVA.* "Premio Simonetti" omaĝas al la unua prezidanto de la ORE kiu disponas pri monsumo por la plej bona Esperanta teksto pri naturscienca temo. Interesuloj sin turnu al la redaktoro de *LA MEVO*, la organo de ORE: Ru Bossong, Floraplein 23, 5466 JS Eindhoven, Netherlands.

## WELCOME NEW MEMBERS!

Thanks to diligent recruiting by the ELNA Central Office, the League has 82 new members so far this year:

Helmut J. Anderson	Wyoming
Fumio Asano	Japan
James S. Campbell, Jr.	Michigan
Harry L. Cannon	San Francisco CA
Harold S. Dewdney	California
Karen L. Dickerson	Georgia
Lee V. Douglas	Washington DC
John & Winona Mathews	California
James W. Mersereau	Maryland
A. A. Milani	Minnesota
Ms. Gussie Murph	Michigan
Ges-roj T. Dixon Oulton	New Jersey
George Sardina	California
Collier P. Skye	New York
Robert Smales	Bermuda
S. A. Snincak	Florida
Kathleen A. Williams	Oregon



# POTPOURRI

## UEA - UN - U.S. Congress - Three Mile Island!

Wearing several hats, Humphrey Tonkin, president of the Universal Esperanto Association, Coordinator of International Programs at the University of Pennsylvania, and vice chairman of the Global Interdependence Center, set up a seminar for the Working Group on Esperanto at the UN.

Participating was Petr Todorov, vice president of the Bulgarian Esperanto Association. Mr. Todorov is an engineer - a specialist in the construction of nuclear power plants, who has been involved in construction of the plant at Kozluduy in northern Bulgaria.

Dr. Tonkin arranged for him to meet with Pennsylvanians for a discussion of Bulgarian efforts to cope with the kind of problem experienced at Three Mile Island. Tonkin also arranged, through Congressman Robert Edgar, a visit to Congress for Mr. Todorov to see how our country conducts its business.

Where did 1,000 Books Go? was the title of an article in Esperanto Review, May 1979, reporting the distribution by the Universal Esperanto Association of 1,000 copies of the textbook Privilegia Vojo al Lingvosocio: Esperanto - Setala (Finland) to 30 developing countries: Algeria, Afghanistan, Bolivia, Chile, China, Egypt, India, Indonesia, Iraq, Yemen, Colombia, Cuba, Kuwait, Madagascar, Malta, Morocco, Mexico, Pakistan, Papua, New Guinea, Puerto Rico, Peru, Senegal, Syria, Sri Lanka, Thailand, Turkey, Uruguay, Venezuela, Vietnam, Zaire.

### Take a Volapükist to Lunch?

Volapük, forerunner of Esperanto in the long line of international languages, could celebrate its 100th anniversary this year, if there were a Volapükist around for the event.

Wales — Since 1922, the Youth of Wales has broadcast a message to the Youth of the World on May 18. This date was chosen to commemorate the first-ever Peace Conference which opened at The Hague in 1899. On that date in 1897, Marconi had transmitted his first Morse Code message across the sea from Flat Holm to Lavernock, South Wales. It is intended that radio stations pick up the message for transmittal around the world.

This year's message is sent in 19 languages, including Esperanto. This year the language of Iran, *farsi*, has been added. The message is dedicated to the International Year of the Child and the need to solve the problems of health, education, ecology, and peaceful coexistence.

"Gejunuloj devas klopodi pli bone kompreni unu la alian por certigi pacan estontecon al la planedo." (Trans.: Youth must endeavor to better understand one another to assure a peaceful future to the planet.)

Note: Welsh is the oldest living language in Europe.

L.M. Boyd in "Grab Bag"  
S.F. Chronicle, May 21, 1979

## ESPERANTO TO TOASTMISTRESSES

Julie Dinnell enlightened the Sacramento (CA) Toastmistress Club on the privileges accruing to those who speak Esperanto. Ms. Dinnell travels exclusively and has Esperanto contacts in many lands. Her slide presentations always have a special flair.

RADIO ROME has added Esperanto to the 21 languages it uses. Esperanto programs are now heard Sunday evenings at 8 o'clock. Radio Vatican has broadcast in Esperanto for many years.

NOTE: The popular Esperanto newspaper HEROLDO periodically lists Esperanto broadcasts from various countries. Heroldo has moved its offices from Brussels to: Calle de Juan Rmon Jimenez 28, 6° A, Madrid 16, Spain.

INTERNATIONAL REPLY COUPONS issued prior to January 1, 1975 are no longer valid, according to information received from the U.S. Postal Service.

## ANNOUNCEMENTS

### Correction to ELNA Address Book:

Correct the telephone number for Cathy Schulze, Newsletter editor, to: [415] 342-1796.

MARK STARR thanks all those friends who sent greetings on the occasion of his 85th birthday — too many for him to answer personally. Mark, an Honorary Member of ELNA, still teaches a class at Stuyvesant Center in Long Island City.

ODD FELLOWS will meet during the World Esperanto Convention in Lucerne to set up an ODD FELLOWS-ESPERANT-ISTA. For further information, contact: Elsa Otto (UK No. 155), Valkenboskade 502, NL-2563 JL, The Hague, Netherlands.

WINE BOTTLE LABELS - Collectors send to: SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt, West Germany.

## VOLAS KORESPONDI

DENMARK: S-ino Gudrun Hansen, Slogsherredsvej 13, Bylderup-Bov, kaj 5 lernantinoj 16-18 jaraj.

IRAN: S-ro Abbas Shareghi Arani, KH. Dampeszehki, Kouche Khosrave, Kouche Cheisari No. 1, Teheran; bahaano.

IRAN: Acbar Sedaghat, Jvanparast Transport, Cucmesfhan, Rasht.

ISRAEL: S-ro Ch. Hochausser-Armony, PK 5171, Haifa.

JAPAN: Bildlibroj por infanoj dez. intersangi Esperanto-Rondo, F-ino Hayasi Sigemi, Satukigaoka 3-3-30-303, Ideka-si, 563.

POLAND: Esperanto-Klaso 2d, Liceo OGOLNE, PL-08-400 Garvolino. 14 gejunuloj, 16-17 jaraj, pri ciuj temoj.

USSR: Krzysztof Mikulski, 293 720 Drogobytych, Gagarin St. 130/4 (Ukraine). Polo 26-jara, studento en politeknika kolegio, konstrua fako.

## ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA BOX 1129, El Cerrito CA 94530

Enclosed is \$\_\_\_\_\_ for \_\_\_\_\_new \_\_\_\_\_renewal membership in ELNA for the year 1979.

NAME \_\_\_\_\_

ADDRESS \_\_\_\_\_

CITY \_\_\_\_\_ STATE \_\_\_\_\_ ZIP \_\_\_\_\_

Check correct category:  Regular (\$15)  Family (\$22.50)  Youth (18 or under) (\$7.50)  
 Student\* (full-time, 25 or under) (\$7.50)  Senior (renewal only, 65 or over) (\$7.50)  
 Life (\$300)

DATE OF BIRTH (if applying for Youth, Student or Senior rate) \_\_\_\_\_


### OPTIONAL INFORMATION

Telephone number: Area code (\_\_\_\_\_) \_\_\_\_\_

Radio call letters (if applicable): \_\_\_\_\_

Name and address of each new member published in ELNA Newsletter and next edition of ELNA-Adresaro unless member indicates otherwise.

OK to publish phone and/or call letters in ELNA-Adresaro?  
 Yes  No



Following a luxurious Sunday brunch at the Sawmill across the Golden Gate Bridge, our buses take us to Muir Woods, a 491-acre preserve of America's oldest living monuments, the *Sequoia sempervirens* commonly called the redwood. We return by ferryboat across San Francisco Bay. So far, Esperantists have registered for the Convention from as far away as Japan, Alaska, and Canada. It looks like one of the best yet. Don't miss it! Convention dates: July 13 - 17.

For Travel Information, contact:

ELNA TOURS, Horizons Travel Service, 928A Sir Francis Drake Blvd., Kentfield CA 94904.  
Telephone: [415] 459-1313

PLEASE IMMEDIATELY NOTIFY THE ELNA CENTRAL OFFICE OF ANY CHANGE IN YOUR ADDRESS OR TELEPHONE NUMBER.

---

## Esperanto League for North America

P.O. Box 1129  
El Cerrito, CA 94530  
Usono/USA



Nonprofit Organization U.S. POSTAGE PAID Berkeley, CA Permit No. 330
--

**NEWS - PLEASE EXPEDITE**

Address Correction Requested  
Return Postage Guaranteed